

Akademio Internacia de la Sciencoj

Oprof Amri Wandel
Prezidanto



Post UK en Seulo, antaŭ SUS en Varsovio

Mesaĝo al la AIS-anoj, septembro 2017

Estimataj membroj kaj kunlaborantoj de AIS,

Baldau komenciĝos la 34-a Sanmarineca Universitata Studadsesio (SUS) en Varsovio, 10-15.9. I.a. Okazos kursoj pri matematiko (Kiselman), Logiko (Fössmeier), Astronomio (Maitzen kaj Wandel), kaj prelegoj pri la historio de AIS, la korea lingvo kaj urba ekologio. Detalaj programoj kaj informoj aperas en la AIS-retejo, <http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus34/programo.pdf>. Vi estas bonvenaj partopreni, eĉ lastmomente aŭ partatempe aliĝi ĉe informo@ais-sanmarino.org. Ne estas partoprenkotizo, kaj la kosto de la loĝado estas tre favora. Dankon al la organiza teamo, mag. Komarincka kaj Oprof. Fössmeier.

Seulo estis mia dua UK kiel prezidanto de AIS. La tendenco de proksimiĝo inter UEA kaj AIS, kiu komencis pasintjare, plu evoluas kaj bone montriĝas en la aldonita artikolo pri la scienca agado en Seulo, kiu aperis en la septembra n-ro de revuo Esperanto. En la inaŭguro de la IKU-AIS parolis la prezidanto de UEA, kiu emfazis la gravecon de IKU kaj scienca agado por la kongreso kaj por Esperanto. Dum la Kongreso okazis kvar AIS-IKU kursoj kaj 14 sciencaj prelegoj, kies resumoj estas legeblaj ĉe: <http://uea.org/teko/IKU>. Ekzameniĝis ĉ. 50 kongresanoj, kiuj ricevis AIS-diplomojn en publika ceremonio dum la Scienca Forumo (gvidata de AIS, unuafoje okazinta en Nitra). La diplomoj estis ankaŭ senditaj rete. La IKU-libro, tekstaro de la AIS- kaj IKU-prelegoj, estis unuafoje eldonita en formo de impona 190-paĝa libro, kolore ilustrita kun fortika kovrilo (red. A. Wandel, 24 eŭroj ĉe UEA).

En Seulo okazis senatkunsido, kiu malgraŭ sia malgrandeco faris plurajn gravajn decidojn (kiuj estis rete ratifitaj de la senato). Ni decidis okazigi la 35-an SUS-on en la venontjara Itala Kongreso en San Marino, 17-24.8.2018, kaj jam nun montriĝas granda interesiĝo, kaj de AIS-anoj kaj de partoprenantoj de la Itala Kongreso (la ĉi-jara Itala Kongreso okazas dum tiuj tagoj, kaj ankaŭ ĝin partoprenas pluraj AIS-anoj). Ni plue decidis ke la formala kunveno de AIS-Germanio, kiu laŭ la regularo devas okazi almenaŭ ĉiun duan jaron, okazos la 2.1.2018, dum la Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken (27.12.2017-3.1.2018). Dum la sama populara jarfina kunveno okazos ankaŭ la 11-a sesio de la Internacia Vintra Universitato. Vi jam nun estas bonvenaj proponi prelegojn (bv. vin anonci ĉe amri@huji.ac.il).

Estis nomumita tri-persona komisiono por revizii la AIS-regularojn kaj konstitucion, en kiu membras kolegoj Fössmeier, Wicksröm kaj mi.

Fine mi ŝatus gratuli kaj bonvenigi nian novan dekanon, Oprof. Christer Kieselmann. Li estros la sekcion de materio-sciencoj kaj aparte la fakon de matematiko.

Ekde kelkaj jaroj AIS ne plu kolektas la jarkotizon de 6,50 eŭroj, tial despli gravas via libervola subteno. Donackvitancojn laŭ la germana impostleĝo eblas peti al trezoristo@ais-sanmarino.org. Eblas pagi per la UEA-konto de AIS (aisc-j) aŭ per la Paypal-konto de AIS, per kreditkartoj aŭ per la butonoj en la AIS-hejmpaĝo.

Amike, Amri